Stefan Klag Walter Klag

# SAT.IROJ




## Dekoka kajero

18a kajero
Unua eldono Vieno 2024
Esperantojaro 138

Se vi havas demandon, skribu al
esperanto@chello.at




Se la sat.iroj plaĉas al vi, bonvole sendu ilin al viaj geamikoj!
Se vi estas satega de la sat.iroj, skribu al ni!
Aliaj numeroj estas elŝuteblaj en Bitoteko, serĉo: satiroj.

La birdo sur la kovrilo partumis la Universalan Kongreson
Rejkjaviko 2013
Foto WK

# ŜERCOJ

**Alkoholo**

Alkoholo estas saniga, ĉar oni povas desinfekti per ĝi la manojn.

**Pli flua**

- Kio estas pli flua ol fumado?
- ???
- Alkoholo. Ĝi estas superflua.

**Superflua**

- La suno estas superflua.
- Kial?
- Nokte ĝi ne brilas kaj tage estas ĉiam hele.

**Supa demando**

Kio estas pli bona: Haroj en la supo aŭ supo en la haroj?

**Astronomio**

- Ĉu loĝas homoj sur la luno?
- Mi ne scias.
- Devas esti, ĉar estas daŭre hele tie!

**En Afriko**

- Kial oni scias, ke la tigro estas sata?
- ???
- Ĉar sinjoro Babuĉako estas nenie videbla.

**Embaraso**

- Ĉar mankis elektro, mi devis atendi unu horon en lifto!
- Mi diras eĉ pli. Mi devis atendi du horojn sur rulŝtuparo!

**Nebone videbla**

- Kiu gajnis en kaŝludo?
- La skeleto!

**Longa kolo**

Ĝirafo ĉe kuracisto: „Mi havas longegan koldoloron!”

**Orfo**

Juĝisto: Vi murdis viajn gepatrojn. Vi estos ege punita!
Akuzito: Kompaton! Mi estas nun orfo!

**Medikamento**

Apotekistino: Du el miaj klientoj mortis!
Amikino: Kion vi donis al ili?

**Bestoj**

A: Kiel oni metas ĝirafon en fridujon?
B: a) Malfermi la fridujon; b) Meti la ĝirafon en la fridujon;
c) Fermi la fridujon.
A: Prave. Kiel oni metas elefanton en fridujon?
B: Kiel supre!
A: Falsa! Oni devas unue elmeti la ĝirafon.
Alia demando: Kiu besto mankas en la konferenco de la bestoj?
B: La elefanto. Ĝi estas en la fridujo.
A: Bone! Ĉu estas danĝere naĝi en riverego?
B: Ne, ĉar la krokodilo estas en la konferenco.

**Premiero**

Paciento: Mi estas ege nervoza. Tio estas mia unua operacio.
Kuracisto: Ankaŭ mia.

**Alternativa adopto**
Gepatroj al filo: Vi adoptiĝis.
Filo: Ĉu vere! Mi volas konatiĝi kun miaj veraj gepatroj.
Gepatroj: Ni estas viaj veraj gepatroj. Nun vi povas veturi al la geedzoj, kiuj adoptis vin.

**Psike**
Dentokuracistino al pacientino: Iom doloros.
Pacientino: Ne problemo. Mi eltenos tion.
Kuracistino: Mi havas seksrilaton kun via edzo.

**La vojo**
Paciento: Bonan tagon, doktoro.
Kuracisto: Vi malbone vidas, ĉu ne?
Paciento: Kial vi scias tion?
Kuracisto: Vi venis tra la fenestro.

**Manko**
Edzino: Kion diris la kuracisto, ĉe kiu vi ĵus estis?
Edzo: Li diris „Bonvolu 300 Eŭrojn”.
Edzino: Ja, bone, sed kion vi havis?
Edzo: 200 Eŭrojn.
Edzino: Ne, kio mankis al vi?
Edzo: 100 Eŭroj.

**Parencoj**
Unu ovo vidis alian ovon kaj demandis: Kial vi havas tiom da haroj?
La alia: Ĉar mi estas kivo.

**Flugkapablo**
Kio havas kvar piedojn kaj povas flugi?
Du birdoj.

**Valora donaco**
Infano al patrino: Antaŭ la pordo estas ulo, kiu kolektas por la maljunulejo.
Patrino: Donu al tiu la avinon.

**Grupe**
Policisto haltigas aŭton:
- Vian stirpermesilon!
- Jen.
- Estas problemo kun via foto!
- Mi estas la tria de dekstre.

# INTELIGENTAJ HAJKUOJ

Preĝanta
Pasero
Pie
Pepas
Preĝeje
\-
Antaŭ
Hospitalo
Staras
Du kuracistinoj
Kaj fumas

# VORTLUDOJ


DU estas du kvinonoj de DUono
Rip-ozo estas rip-malsano.
Tea-tra-ĵeto ne estas teatraĵ-eto.



Barb.aro




Ten.oro



WK 2023

Ok.ulo



So.literoj



Soliteroj

# FINVENKO PROKSIMA

fido™
ALLIANCE

FIDO
MICRO CREDIT

fido™






BENU
APOTHEEK




Benu
Medical Personal GmbH







Por fumantoj

BOTELO


GEFU®

Flaschenverschluss,
2 Stck.

Fermilo por boteloj




Pli rapide ne eblas




# grandulo

*Imagen generada por LlevaTilde.es*

# PLI SAĜE NE EBLAS

Kiu lernis pensi komplike, tiu ne povas ĉiam pensi malkomplike.

Kabano, en kiu oni ridas, estas pli bona ol palaco, en kiu oni ploras.

Arde tiklas en la nazo tute freŝa ŝenoprazo.

Pri la vojo testudo scias pli ol leporo.

Ĉiu persino estas persono, sed ne ĉiu persono estas persino.

Dekoka ne estas de koka.

Posthieraŭ estas la nova hodiaŭ.

Ĉu en la estonteco ekzistos mono aŭ ne?
Ekspertoj konas du teoriojn: Ĉiam estos mono. Iam ne plu estos.
La kompromiso estas la miksita sistemo kiel nun: Kelkaj havas monon, aliaj ne.

# VORTFAMILIOJ


| | |
|---|---|
| Besto | |
| Festo | Fakto |
| Gesto | Jakto |
| Kesto | Kakto |
| Nesto | Lakto |
| Pesto | Pakto |
| Resto | Ŝakto |
| Testo | Takto |
| Vesto | |

# VORTPIRAMIDOJ

Ĉ
Ĉi
Ĉie
Ĉiel
Ĉielo

O
Go
Ago
Sago
Sango
Slango

# ENIGMO



Preskaŭ la sama.
Maldekstre estas unu litero pli.
SK

# NE ENIGMO




Konstanta vetero en Vieno la 30an de novembro 2023

KREDU NUR TION, KION VI MEM MENSOGAS!

Vian kontribuaĵon por la sekva numero

bonvole sendu al

esperanto@chello.at